

Redakta Komitato: D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich,
D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stöp-Bowitz
Ĉefa kaj respondeca redaktoro Prof. B. Popović, Zagrebačka 24,
SARAJEVO, Jugoslavio

Lingva kontrolo de Prof. M. Šaponjić, Beograd

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned. gld. = 2,2
dol. = 1500 Din

Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkotizo 10 steloj)

La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdaje naučna sekcija Saveza esperantista Jugoslavije, Terazije 42,
Beograd (=jugoslovenska podružnica Međunarodnog naučnog društva
esperantista). Za izdavača: odgovorni urednik Prof. Dr. Bož. Popović,
(Zagrebačka 24, Sarajevo)

Ŝtampano u Grafičkom preduzeću »ŠTAMPA«, Sarajevo; za štampariju
Simo Buičić.

SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92
Vol. 15
N-roj 1-2 (57-58)
29. 1. 1965.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 1.500 din.

Enhavo:

- D. L. Armand:* Per esperanto helpi sciencan kaj teknikan dokumentadon
ISAE-TC-111: Kion niaj fakvortaristoj devas atenti?
E. Wüster: Pri la litersimboloj por lingvoj
ISAE-TC-112: La internaciaj simboloj por lingvoj
H. Yagi: Esenco de la japana arto
W. Ehrenberg: Ĉu la relativectorio estas revizienda? (2-a parto)
J. Pierzchlewicz: La problemo de sekureco en ferbetona normo
L. Molnár: Mikosizo fungoida
T. Nomra: Nutrado de Pinctada martensii
J. Treherne (trad *T. Bluett*): La influo de la insektoj je historio
ISAE-TC-109: La normformato por leterpaperoj kaj libroj
ISAE-TC-113, 115: El la fakoj

002 : 001 + 62

PER ESPERANTO HELPI SCIENCAN KAJ TEKNIKAN INFORMADON!

(D-ro **D. L. Anmand**, Moskvo)

La plejparto de sciencistoj rifuzas lerni kaj uzi Esperanton ĉar ili ne vidas vojon tiri el ĝi profiton. Certe, ellerninte anglan, rusan aŭ alian disvasitigitan nacian lingvon, sciencisto ricevas eblecon legi pli multe da libroj, ol ellerninte Esperanton. Nun ni ankoraŭ ne povas konkuri kun naciaj lingvoj en la kreado de scienca literaturo. Do, fincelante atingi tiun staton, kiam Esperanto iĝos komuna lingvo de scienco, ni devas nun dediĉi niajn fortojn al tiaj ĝiaj aplikoj, kiaj

jam hodiaŭ povas alporti realan utilon al vastaj rondoj de plej diversaj fakuloj. El tiaj aplikoj unuavica estas scienca kaj teknika informadoj (STI).

Ĉiu sciencisto kaj teknikisto devas esti en kurso de novaĵoj en sia fako. Nun la problemoj fariĝas malfacilega, ĉar ĉiujare oni publikas milionojn da artikoloj, libroj, patentoj. Ĝi komplikiĝas ankoraŭ multobe pro la diverslingveco de aperanta STI. Lernado de plej gravaj lingvoj (jam ne solvas la problemon, ĉar en nia epoko, kiam revekiga nacia konscio de ĉiuj popoloj, gravaj eltrovoj estas publikataj en dekoj da lingvoj. Jen kie Esperanto devas helpi al sciencistoj! Koncizaj informoj pri publikata faka literaturo estas la kampo, en kiu avantaĝoj de internacia lingvo estas plej videblaj. Per elspezo de tre modestaj rimedoj unu lingvo povas informi mondan sciencistaron pri novaĵoj, aperantaj en ĉiuj lingvoj, interalie malmulte konataj.

La grado de koncizigo de STI povas esti diversa. La plej simpla kaj facila formo estas la traduko de enhavoj de libroj kaj revuoj esperanten. Tiuj enhavoj okupas sensignifan lokon en libro, tamen ili donas al la alilingva leganto indikon: plenan tradukon de tiuj artikoloj aŭ ĉapitroj li devas mendi. Tiun metodon jam dum kvar jaroj uzas Moskva filio de la Geografia societo de USSR, en publikataj artikolaroj »Geografiaj demandoj«. La societo ricevis plurajn gratulojn kaj dankojn de alilandaj geografoj pro ĉi iniciato.

Dua grado de konciza STI estas prinotoj kaj resumoj. La unuajn oni metas antaŭ, la duajn — post la teksto. Plej praktika procedo — presi resumojn en la fino de revuo sur apartaj paĝoj; ĉiu resume — laŭ formo kaj dimensio de la kutima biblioteka slipo. Sur unu flanko de folio oni presas resumon en nacia lingvo de eldonlando, sur alia — en Esperanto. Ĉiu leganto povas eltondi interesan por li resumon kun bibliografiaj sciigoj kaj meti en sian sliparon. Sperto montras, ke esperantaj resumoj estas esence kompreneblaj por fakuloj eĉ se ili ne scias la lingvon.

Ĉiu membro de ISAE, ligita kun iu redakcio, devas uzi sian influon por enkonduki esperantajn resumojn en periodajn eldonojn kaj librojn, ĉiu ne ligita — postuli tion per individuaj aŭ kolektivaj leteroj al redakcioj. Redakcioj pli volonte konsentos publikigi esperantajn resumojn aŭ enhavojn, se lokaj esperantaj sekcioj de ISAE aŭ similaj grupoj proponos senpage traduki ilin esperanten por ĉiu numero. Tio estos bona laboro por esperantistoj, samtempe instiganta ilin perfektigi la lingvon kaj kompletigi sciencajn terminarojn.

Tria formo de peresperanta STI estas aldono de esperantaj titoloj kaj tekstoj en tabeloj kaj sub ilustraĵoj. Traduko povas esti presata

apud la nacia teksto aŭ en apartaj aldonataj broŝuroj. Kelkaj japanaj, nederlandaj kaj aliaj revuoj jam uzas ĉi — metodon.

La plej disvolvita formo de STI estas referato. Esperantaj organizaĵoj ankoraŭ ne ekhavis sufiĉan forton por publikigi proprajn referatajn revuojn. Tamen ili povas liveri al ekzistantaj revuoj referatojn de novaj esperantaj libroj. Tio jam estas praktikata en geografia serio de sovetia »Referata revuo«. Pro tio legantoj kutimiĝas al penso, ke la esperanta literaturo estas sufiĉe serioza, por ke oni povu ĉerpi el ĝi STI.

Alia bonega formo de laboro por ISAE'anoj estas prelegoj en neesperantaj aŭditorioj: en esploraj institutoj, universitatoj, sciencaj societoj, studenaj kluboj, kolokvioj, seminarioj ktp. Kiel materialo por propagando estas necese uzi du vicojn da faktoj: I) ekzemplojn de obstakloj, miskomprenoj, vanaj elspezoj ktp., rezultataj el multlingvece, ekzemplojn de neefektiveco de tradiciaj metodoj venki lingvajn barojn (studado en mezlernejoj de fremdaj lingvoj, multlingvaj eldonoj, sinkrona tradukado ĉe kongresoj, tradukmaŝinoj ktp.); ekzemploj de fruktodona utiligado de Esperanto por STI: internaciaj kongresoj, scienca korespondado, ekspozicioj ktp. Ne estos troa ŝarĝo se ĉiu ISAE'ano prenos memvolan devon tralegi almenaŭ unu prelegon ĉiujare. Certe plejgrave estas uzi ĉiun okazon por prelegi pri utileco de Esperanto ĉe internaciaj kunvenoj de sciencistoj.

Ankoraŭ unu rekomendenda formo de laboro estas eldono de »murbultenoj«. La plejparto de niaj sekcioj ankoraŭ ne povas eldoni presitajn bultenojn. Tamen, eĉ unuopuloj povas kolekti propagandajn materialojn kaj tajpi ilin en 4—5 ekzempleroj. Temoj povas esti la samaj, kiel por prelegoj, precipe en populara, interesa formo, kaj krome — recenzoj, disputoj pri novaj libroj, kronikoj de fakaj kunvenoj ktp. Materialoj, preferinde tajpitaj paralele en Esperanto kaj nacia lingvo, devas esti surgluataj sur dikajn paperojn kaj regule pendigataj en anonclokoj de esploraj institutoj, altlernejoj, sciencaj societoj kaj kluboj. Post kelka tempo la murbulteno povas esti transportata en alian institucion. Laŭ fortoj de la loka sekcio de ISAE la murbulteno povas eliri en periodoj de 1 ĝis 3 monatoj. Esperanta kaj nacilingva gazetaro, radiodissendoj, personaj spertoj de esperantistoj donas por novaj bultenoj multege da faktoj. Materialo povas esti diferencigata laŭ intereso de propagandataj rondoj.

Estos utile, se ISAE'anoj, eksciinte, ke iu organizaĵo preparas sciencajn aŭ teknikan ekspozicion por sendo eksterlanden, proponos traduki en Esperanton klarigajn subskribaĵojn kaj tekstojn.

Inventemo kaj vigla iniciato, certe, helpas al samideanoj trovi ankoraŭ multajn okazojn utiligi internacian lingvon por celoj de inter-

kompreno kaj interŝanĝo de diverslandaj sciencistoj. La ĉefa ideo, penetranta ajnajn formojn de propagando kaj inokulenda cerbojn de sciencistoj devas esti: Esperanto povas fariĝi ilia helpanto en levo de profesia kvalifiko kaj unu el la gravaj rimedoj de ĝenerala scienc-
-teknika progreso.

Samtempe kun propagando ni devas senĉese prizorgi progreson de la lingvo, ĉiam adaptante ĝin al la kreskantaj postuloj de scienco. Pro tio laboro pri la kompono de terminaroj estas gravega. Samtempa ellaborado de terminologio de la tuta scienca fako estas prosperoza ne nur pro tio, ke ĝi riĉigas la leksikonon, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi donas protekston kaj eblecon ordigi sciencajn konceptojn mem. El ĉiuj formoj de terminaroj preferenda estas tia, kia donas ne nur tradukon de terminoj al la lingvo de aŭtoro, sed samtempe — klarigon de termino en Esperanto. Ĉi lasta parto ebligas facile aldoni ĝian tradukon al ĉiu alia nacia lingvo.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

030.8+413.164 (= 408.92)

KION NIAJ FAKVORTARISTOJ DEVAS ATENTI?

LABORPLANO POR VERKADO DE MEMSTARA ESPERANTA FAKVORTARO KONSISTANTA EL UNIFORMAJ DIVERSFAKAJ EROJ

(ISAE-TC-111)

elverkita de la TERMINOLOGIA CENTRO de I. S. A. E. kaj la SEKCIO POR TEKNIKAJ VORTAROJ (R. Haferkorn) en kunlaboro kun la SEKCIO PRI LA ĜENERALA VORTARO (A. Albault) de la AKADEMIO DE ESPERANTO.

Rim.: Apartan instigon al jena verkaĵo donis la »Laborplano por verkado de esperanta terminaro por komerco kaj industrio« (F. Munniksma).

I. Ĝeneralaĵoj

Ĉiu el la individuaj diversfakaj terminaroj, kiuj estas destinitaj por iam formi kune unuforman enciklopedion en Esperanto, plenumu jenajn kodiĉojn:

- 1e: Ĝ estu moderna kaj ĝisdata;
- 2e: ĝi laŭbezzone difinu la terminojn; nur karakterize fakteknikaj vortoj bezonas difinon, ekz-e aerkvanto-mezurilo, agadregiono, akcesora avertilo, akvoturo, ktp. Multajn vortojn ni kompreneble ne bezonas difini, nome kiam la signifo jam klaras per si mem kaj ilia signifo estas »universalaj«, ekz-e ĉambrobrulo, estingilo, garaĝo, kaŭĉuktubo, ktp. En kelkaj okazoj povas esti utile, krom tio aldoni sub tiuj vortoj mallongajn Esperantajn frazejn, en kiuj ili aperas en kunteksto (laŭ la modelo de la PV);